V - 19034/1977


# EL POPOLA ĈINIO

1
1977
中国報道




Varma aklamo al Kamarado Hua Guofeng, ke li fariĝis prezidanto de la Centra Komitato de KPĈ kaj prezidanto de la Milita Komisiono de CK de KPĈ.

Varma aklamo pro la granda venko de la frakaso de la intrigo de la kvarpersona kontraŭpartia kliko uzurpi la gvidantecon de la Partio kaj la ŝtato



La granda gvidanto kaj instruisto Prezidanto Maŭ Zedong



Prezidanto Hua Guofeng



Prezidanto Hua Guofeng intime salutas sur Tian-anmen-pordego la amasojn ĉeestantajn la celebran mitingon.

Miliono da armeanoj kaj popolanoj de Pekino solene kunvenas sur Tian-anmen-placo por varme celebri la grandan venkon.








Prezidanto Hua Guofeng kaj Vicprezidanto
Je Gianjing sur Tian-anmen-pordego

# CELEBRO DE LA GRANDAJ VENKOJ





Prezidanto Hua Guofeng kaj aliaj gvidantoj de la Partio kaj la ŝtato kun ĝojo ĉeestas la mitingon.

*Supre dekstre:* Diversnaciecaj popolanoj ĝojplenaj pro la venko

*Malsupre dekstre:* Laboristoj de la ĉefurbo ĝoje festas la venkon.










Sur Tian-anmen-placo regas atmosfero de solidareco, batalo kaj triumfo.



Aklamado pri la granda venko






Popolamasoj manifestacias alte tenante rubandon kun surskribita slogano "For la kontraŭpartian klikon de Vang-Ĝang-Giang-Jaŭ!" kaj laŭte krias: "For la kvarpersonan bandon!"



Kantu kaj dancu pro la venko.

Popolanoj de ĉefurbo manifestacias por varme celebri la venkon.



Komandantoj kaj batalantoj de la Ĉina Popola Liberiga Armeo laŭte krias: "For la kvarpersonan bandon!"





Arbaro de ruĝaj flagoj kaj maro de homoj

EL POPOLA ĈINIO
中国报道
1977
N-ro 1
(221)

Monata gazeto eldonata de ĈINA ESPERANTO-LIGO P.O. Kesto 77, Pekino, Ĉinio

Ĝenerala distribuanto: Guozi Shudian P.O. Kesto 313, Pekino, Ĉinio

KOVRILO:

Paĝo 1: Varma celebrado

Paĝo 2: Varma aklamo al Kamarado Hua Guofeng, ke li fariĝis prezidanto de la Centra Komitato de KPĈ kaj prezidanto de la Milita Komisiono de CK de KPĈ.

Varma aklamo pro la granda venko de la frakaso de la intrigo de la kvarpersona kontraŭpartia kliko uzurpi la gvidantecon de la Partio kaj la ŝtato.

Paĝo 4: En kora ĝojo

BILDPAĜOJ:

1. Celebro de la grandaj venkoj
2. Armeanoj kaj popolanoj de diversaj lokoj de la tuta lando en solena kunveno kaj manifestacio por celebro de la grandaj venkoj



# Enhavo

Celebrado de la grandaj venkoj . . . . . . . . 2

Parolado de Kamarado Vu De en la celebra mitingo de la ĉefurbo . . . . . . . . . . . . . . . 11

Granda historia venko . . . . . . . . . . . 14

Kamarado Hua Guofeng fariĝis gvidanto de nia partio, tio estis saĝa decido de Prezidanto Maŭ . . . . . 18

AL LA LEGANTOJ

Karaj legantoj:

Pro certa kaŭzo la 11-a kaj 12-a n-roj de 1976 de nia gazeto estas prokrastitaj kaj eldonotaj duope. Tion ĉi sciigante al vi ni sendas al vi ALTAJN SALUTOJN!


Redakcio de EL POPOLA ĈINIO

*Prezidanto Hua Guofeng kaj aliaj gvidantoj de la Partio kaj la ŝtato en la celebra mitingo. De maldekstre: Sajfudin, Su Ĝenhua, Ĉen Jongguj, Vej Guoking, Vu De, Gi Dengkuj, Li Hiannian, Hua Guofeng, Je Gianjing, Ĉen Hilian, Vang Donghing, Hju Ŝijoŭ, Li Deŝeng, Vu Gujhian kaj Ni Ĝifu.*



# Celebrado de

EN la 24-a de oktobro, 1976, miliono da armeanoj kaj popolanoj de Pekino ĝojege okazigis solenan kaj grandiozan mitingon sur la majesta kaj impona Tian-anmen-placo, por varme festi la nomumiĝon de Kamarado Hua Guofeng kiel prezidanto de la Centra Komitato de la Komunista Partio de Ĉinio kaj prezidanto de la Milita Komisiono de la Centra Komitato de la Komunista Partio de Ĉinio, kaj la grandan venkon super la kontraŭpartia kliko de Vang Hongven, Ĝang Ĉunkiaŭ, Giang King kaj Jaŭ Venjuan kiuj konspiris uzurpi la gvidantecon de la Partio kaj la ŝtato. La vastaj amasoj firme decidis plej kompakte unuiĝi ĉirkaŭ la Centra Komitato de la Partio estrata de Kamarado Hua Guofeng, daŭrigi la aferon postlasitan de Prezidanto Maŭ, persisti en preno de la klasbatalo kiel la ĉefĉenero, persisti en la fundamenta linio de la Partio, persisti en daŭrigo de la revolucio sub la diktaturo de la proletaro, gajni pli grandan ven-




# la grandaj venkoj

kon en la socialismaj revolucio kaj konstruado, kaj konduki ĝis la fino la proletan revolucian aferon komencitan de Prezidanto Maŭ.

En tiu tago, la senlime vasta ĉielo prezentiĝis lazura kaj la suno verŝis sian ĝajan lumon sur Pekinon. La placo estis bele dekoraciita kaj montriĝis aparte impona. Sur la alta Tiananmen-pordego pendas ruĝaj lanternoj kaj ruĝaj flagoj flirtas en vento. Giganta portreto de la granda gvidanto kaj instruisto amata de la ĉina popolo Prezidanto Maŭ pendas meze en la pordego. La gigantaj portretoj de Marks, Engels, Lenin kaj Stalin alte staras oriente kaj okcidente de la placo. Antaŭ la Monumento de Popolaj Herooj staras du okulfrapaj sloganoj: "Varman celebradon de la nomumiĝo de Kamarado Hua Guofeng kiel prezidanto de CK de KPĈ kaj prezidanto de la Milita Komisiono de CK de KPĈ!" "Varman celebradon de la granda venko super la 'kvarpersona bando', kiu konspi-


*Aliaj gvidantoj de la Partio kaj la ŝtato ĉeestantaj la celebran mitingon*



ris por uzurpi la gvidantecon de la Partio kaj la ŝtato!"

Hua Guofeng, prezidanto de la Centra Komitato de la Komunista Partio de Ĉinio, ĉefministro de la Ŝtata Konsilantaro kaj prezidanto de la Milita Komisiono de la Centra Komitato de la Komunista Partio de Ĉinio ĉeestis la mitingon. Kiam Prezidanto Hua Guofeng kaj aliaj gvidantoj de la Partio kaj la ŝtato ascendis la pordegon en la melodio de *Marnavigo dependas de stiristo*, la tuta placo dronis en ekstrema ĝojo. Huraado, kriado de sloganoj, tamtamado kaj tamburado tondris tra la ĉielo. La sceno montris, ke la 30 milionoj da kompartianoj kaj 800 milionoj da popolanoj elkore subtenas kaj fidas sian gvidanton Prezidanton Hua Guofeng kaj la Centran Komitaton de la Partio, kaj la popolo havas plenan kredon al la granda socialisma afero kaj la perspektivo de komunismo. De tempo al tempo Prezidanto Hua Guofeng en verda militista uniformo kore salutis per mansvingo al la miliono da kunvenantoj.

La granda gvidanto Prezidanto Maŭ persone difinis Kamaradon Hua Guofeng kiel prezidanton de CK de KPĈ kaj prezidanton de la Milita Komisiono de CK de KPĈ. La Centra Komitato de la Partio estrata de Prezidanto Hua Guofeng fiaskigis la konspiron de la "kvarpersona bando" uzurpi la gvidantecon de la Partio kaj la ŝtato kaj per tio forigis la kaŝitan danĝeron por la Partio kaj la ŝtato kaj mildigis la indignon de la popolo. La ekstreme ĝojiga informo senprecedence ekscitis la popolon de Pekino kaj la popolon de la tuta lando. La heroaj pekinanoj en granda ĝojo de la venko, alte tenante portretojn de la granda gvidanto Prezidanto Maŭ kaj Prezidanto Hua Guofeng, ruĝajn kaj kolorajn flagojn kaj tabulojn kun sloganoj, tamtamante, tamburante kaj eksplodigante petardojn, tajde puŝiĝis al la Orienta kaj Okcidenta Ĉang-anstratoj, al Tian-anmen-placo. La tuta placo kaj la larĝaj stratoj Ĉang-an en ĝiaj ambaŭflankoj estis plene kovrataj de arbaro de ruĝaj flagoj kaj maro de gajaj amasoj. La kunvenantaro konsistis el heroaj komandantoj kaj batalantoj de la ter-, mar- kaj aertrupoj de



la Ĉina Popola Liberiga Armeo, laboristoj-milicianoj de la ĉefurbo, laboristoj de industrioj de ŝtalo, karbo, tekstilado k.a., membroj de antaŭurbaj popolaj komunumoj, laborantoj de la centraj kaj pekinaj magistrataj institucioj, instruistoj kaj studentoj de superaj lernejoj, ruĝgvardianoj kaj ruĝgvardianetoj de mezaj kaj elementaj lernejoj, k.a. "Plej kompakte unuiĝu ĉirkaŭ la Centra Komitato de la Partio estrata de Prezidanto Hua Guofeng!" "Ĉiuj agoj estu direktataj de la Centra Komitato de la Partio!" "For la kontraŭpartian klikon de Vang Hongven, Ĝang Ĉunkiaŭ, Giang King kaj Jaŭ Venjuan!" "Firmigu kaj disvolvu la grandajn venkojn de la Granda Proleta Kultura Revolucio!" "Vivu la granda, glora kaj ĝusta Komunista Partio de Ĉinio!" "Vivu la ĉiamvenka Marksismo-Leninismo-Maŭzedongpenso!" La entuziasmaj sloganaj krioj, kiuj esprimas la komunan volon de la centoj da milionoj da ĉinoj, skuis la ĉielon kaj la teron.

La 3-an horon ptm., Ni Ĝifu, kandidata membro de la Politika Buroo de CK de KPĈ, sekretario de la Pekina Komitato de KPĈ kaj vicprezidanto de la Pekina Revolucia Komitato anoncis la komenciĝon de la mitingo. Tiam ĉiuj tamtamoj kaj tamburoj sur la placo eksonis kaj milita fanfaro ludis la nacian himnon de la Ĉina Popola Respubliko kaj *Ruĝas la Oriento*.

Vu De, membro de la Politika Buroo de CK de KPĈ, la unua sekretario de la Pekina Komitato de KPĈ kaj prezidanto de la Pekina Revolucia Komitato faris gravan paroladon al la mitingo. (La plena teksto de lia parolado troviĝas sur p. 11.) Lia parolado rikoltis fojan kaj refojan tondran aplaŭdon.

Ĉen Fuhan, estro de la lokomotivo Maŭzedong, Gia Huajĝen, vicsekretariino de la partia filio de Hjugiavu-brigado de Pinggu-gubernio, batala heroo Hju Henglu de ĈPLA kaj ruĝgvardiano Ĝang Hong de la Dependa Mezlernejo de Kinghua-universitato faris paroladojn al la mitingo reprezentante respektive la ĉefurbajn laboristojn, malriĉkamparanojn kaj malsuperajn mezkamparanojn, la Ĉinan Popolan Liberigan Armeon kaj la Ruĝan Gvardion. Ili unuvoĉe esprimis, ke ili kore, varme kaj rezolute sub-

tenas la nomumiĝon de Kamarado Hua Guofeng kiel prezidanto de la Centra Komitato de la Partio kaj prezidanto de la Milita Komisiono de CK de KPĈ, kaj kore, varme kaj firme subtenas la Centran Komitaton de la Partio estratan de Kamarado Hua Guofeng en frakaso de la kontraŭpartia kliko de Vang Hongven, Ĝang Ĉunkiaŭ, Giang King kaj Jaŭ Venjuan.



*Dommastrinoj de Pekino varme aklamas, ke Kamarado Hua Guofeng fariĝis prezidanto de la Centra Komitato de KPĈ kaj prezidanto de la Milita Komisiono de CK de KPĈ.*

Kamarado Ĉen Fuhan diris, ke la "kvarpersona bando" estas kontraŭrevoluciaj konspirantoj kaj duvizaĝuloj, ili energie praktikis reviziismon sin kaŝante malantaŭ la ŝildo de Marksismo. Ili sin metis super Prezidanton Maŭ kaj la Centran Komitaton de la Partio, iris tute alian vojon kaj distrumpetis pri si mem. Fakte ili estas multe pli ferocaj ol kapitalistoj, estas kategoriaj burĝaj elementoj suĉantaj la sangon de laboristoj. Antaŭ sia forpaso nia granda gvidanto Prezidanto Maŭ plurfoje kritikis kaj edukis ilin, sed ili neniom pentis pri siaj faroj. Dum la tempo de graviĝo de la malsano de Prezidanto Maŭ kaj post lia forpaso, ili pliintensigis sian kriman aktivadon por uzurpi la gvidantecon de la Partio kaj la ŝtato, opiniante ke venis al ili bona ŝanco. Ili malice falsis testamenton de Prezidanto Maŭ, intencante renversi la Centran Komitaton de la Partio estratan de Kamarado Hua Guofeng, uzurpi la plej altan potencon de la Partio kaj la ŝtato, renversi la diktaturon de la proletaro kaj restaŭri kapitalismon. Kamarado Ĉen Fuhan daŭrigis, ke la ĉefurba laboristaro havas revolucian tradicion de malcedema batalo kontraŭ reviziismo, kuraĝas batali ĝisfine kun la

*Pekinaj amasoj trapasas Tian-anmen-placon kantante kaj dancante.*



enpartia burĝaro kaj firme kredas pri sia nepra venko en ĉiu batalo. Ili decidis plej kompakte unuiĝi ĉirkaŭ la Centra Komitato de la Partio estrata de Prezidanto Hua Guofeng, meti ĉiun sian agon sub la direkton de la Centra Komitato de la Partio, fari firman batalon kontraŭ la kontraŭpartia kliko de Vang-Ĝang-Giang-Jaŭ kaj firmigi la diktaturon de la proletaro. Ili decidis per pli granda revolucia energio **"teni la revolucion, stimuli la produktadon kaj aliajn laborojn kaj preparon kontraŭ milito"**, pli bone disvolvi la movadon de lernado de Daking en industrio, pene plenumi kaj superplenumi la ŝtatan planon, pli bone fari diversajn laborojn kaj gajni pli grandajn venkojn de la socialisma revolucio kaj socialisma konstruado.

Kamaradino Gia Huajĝen diris, ke la neindulgebla krimo de la kontraŭpartia kliko de Vang-Ĝang-Giang-Jaŭ vekis ekstreman indignon de la malriĉkamparanoj kaj malsuperaj mezkamparanoj. Ili ne scipovis labori en fabriko, nek kulturi kampon, nek militi, sed lertis nur kovadi konspiron kaj maĥinacion, trouzi potencon, insidi aliulojn; ili artifikis per sia plumo, fripone miksante veron kun malvero kaj fabrikante mensogojn; ili semis malpaciĝon, incitis tumulton kaj agis senbride kaj despote. Ili estas niaj mortaj malamikoj. Ŝi diris, ke la kamparanoj, kiuj multe suferis de mizero en la malnova socio, plej bone konscias la hodiaŭan feliĉon. Vang-Ĝang-Giang-Jaŭ intencis retiri la popolon en la abismon de suferoj, kio estas neniel konsentebla de la vastaj amasoj de malriĉkamparanoj kaj malsuperaj mezkamparanoj. Gia Huajĝen daŭrigis: "La Centra Komitato de la Partio estrata de Prezidanto Hua Guofeng ligiĝas kun ni malriĉkamparanoj kaj malsuperaj mezkamparanoj koron kun koro. Ni decidis plej kompakte unuiĝi ĉirkaŭ la Centra Komitato de la Partio estrata de Prezidanto Hua Guofeng, persisti en la fundamenta linio de la Partio, preni la klasbatalon kiel la ĉefĉeneron, pli bone disvolvi la movadon de lerno de Daĝaj en agrikulturo kaj ĝeneraligo de Daĝaj-tipaj gubernioj, pluapaŝe disvolvi la bonegan situacion en la kamparo, firmigi la socialisman pozicion en la kamparo kaj fari pli grandajn kontribuojn por la ŝtato."

Kamarado Hju Henglu diris, ke Vang-Ĝang-Giang-Jaŭ estas ekstreme insidemaj kaj ferocaj




*Diversnaciecaj lernantoj de la Centra Instituto por Nacimalplimultoj devenantaj de laboristoj, kamparanoj kaj soldatoj varme partoprenas en la celebra manifestacio.*



*Armeanoj kaj popolanoj de Pekino en grandioza celebra manifestacio*

burĝaj karieristoj kaj intriguloj, similaj al Ĥruŝĉov. Ili senskrupule kaj freneze konspiris kontraŭ la granda gvidanto kaj instruisto Prezidanto Maŭ, kontraŭ la estimata kaj amata Ĉefministro Ĝoŭ, kontraŭ Kamarado Hua Guofeng kaj aliaj gvidantoj de la Centra Komitato de la Partio, kaj plenenergie aktivadis por uzurpi la potencon de la Partio kaj la ŝtato. Ili tutforte oponis kontraŭ la proleta armekonstrua linio de Prezidanto Maŭ, ĉiamaniere kalumniis la Ĉinan Popolan Liberigan Armeon fonditan kaj edukitan de Prezidanto Maŭ, neigis la revolucian tradicion de nia armeo, subfosis la konstruadon de la armeo kaj la milicio, subfosis la solidarecon interne de la armeo kaj tiun de la armeo kun la popolo, intencis konfuzi kaj ruinigi la armeon — nian Grandan Muron. Hju Henglu daŭrigis: "Ni esprimas nian firman volon al la Centra Komitato de la Partio estrata de Prezidanto Hua Guofeng: Ni nepre kompakte unuiĝos ĉirkaŭ la Centra Komitato de la Partio estrata de Prezidanto Hua Guofeng, metos ĉiujn niajn agojn sub la komandon de la Centra Komitato de la Partio. Kien nin direktos la Centra Komitato de la Partio, tien ni marŝos kaj batalos. Ni defendos per la sango kaj vivo Marksismon-Leninismon-Maŭzedongpenson, la proletan revolucian linion de Prezidanto Maŭ, la diktaturon de la proletaro, la Centran Komitaton de la Partio estratan de Prezidanto Hua Guofeng. Ni nepre persistos en la armekonstrua linio de Prezidanto Maŭ, plifortigos la konstruadon de la armeo kaj la milicio sub la unueca gvido de la Partio, rigore observos la tri disciplinojn kaj ok punktojn de atentigo, altigos la singardemon por defendi la Partion. Ni nepre liberigos Tajvan."

Kamarado Ĝang Hong diris, ke ili estas ruĝgvardianoj de Prezidanto Maŭ. Antaŭ 10 jaroj, kiam la movado de la Ruĝa Gvardio apenaŭ leviĝis en la ŝtormo de la Granda Proleta Kul-




*Kamparanoj de la antaŭurboj de Pekino varme celebras la grandan venkon.*




*Ĝoja kaj varma celebrado*



*Ankaŭ fremdlandaj geamikoj en Pekino ĉeestas la mitingon.*

tura Revolucio, la granda gvidanto Prezidanto Maŭ persone skribis leteron por varme subteni la Ruĝan Gvardion kaj laŭdi ĝian revolucian spiriton. En la lastaj 10 jaroj la instruo de Prezidanto Maŭ prilumas la vojon de la Ruĝa Gvardio kiel brilega lumturo kaj kuraĝigas ilin batali kontraŭ reviziismo, la burĝaro kaj la enpartiaj potenctenantoj irantaj la kapitalisman vojon. Ili decidis daŭre teni alte la standardon **"pravas ribelo kontraŭ la reakciuloj"** kaj forte batali kontraŭ la kontraŭpartia kliko de la "kvarpersona bando" por plene elimini tiujn ĉi fiinsektojn. Ĝang Hong daŭrigis: "Ni nepre daŭrigos la aferon postlasitan de Prezidanto Maŭ, pene klopodos por atingi la kvin kriteriojn difinitajn de Prezidanto Maŭ por daŭrigantoj de la revolucio por bone daŭrigi la revolucion. Ni persistos iri la brilan vojon kombini sin kun laboristoj kaj kamparanoj montritan de Prezidanto Maŭ kaj frakasos per praktikaj agoj la revon de la imperiistoj, reviziistoj kaj reakciuloj pri kapitalisma restaŭro en Ĉinio."

Varman aplaŭdon rikoltis la paroladoj de la reprezentantoj de laboristoj, kamparanoj, soldatoj kaj ruĝgvardianoj.

20 minutojn post la 4-a horo ptm, la mitingo finiĝis en la solena melodio de *La Internacio*. Prezidanto Hua Guofeng kaj aliaj gvidantoj de la Partio kaj la ŝtato iris al la orienta kaj okcidenta ekstremoj de la pordego kaj senĉese mansvinge salutis al la kunvenantoj sur la placo. Tiam tondris ĉiuj tamtamoj kaj tamburoj, svingiĝadis koloraj flagoj, la amasoj huraadis kaj saltadis. La tuta placo dronis en festa atmosfero de unuiĝo, batalo kaj triumfo.

Mitingo kaj manifestacio okazis ankaŭ en aliaj 28 provincoj, municipoj kaj aŭtonomaj regionoj. Tie oni varme celebris, ke Kamarado Hua Guofeng nomumiĝis kiel prezidanto de la Centra Komitato de la Partio kaj prezidanto de la Milita Komisiono de la Centra Komitato, kaj ke venkita estis la konspiro de la kontraŭpartia kliko de Vang Hongven, Ĝang Ĉunkiaŭ, Giang King kaj Jaŭ Venjuan por uzurpi la gvidantecon de la Partio kaj la ŝtato. En la ĝojegaj tagoj la ĉina popolo nutrita per Maŭzedongpenso decidis brave marŝi laŭ la revolucia linio de Prezidanto Maŭ kaj gajni pli grandajn venkojn, sub la gvido de la Centra Komitato de la Partio estrata de Prezidanto Hua Guofeng.

# Parolado de Kamarado Vu De en la celebra mitingo de la ĉefurbo



*Kamarado Vu De en parolado*

Gekamaradoj kaj geamikoj:

Hodiaŭ, la reprezentantoj de la partiaj, registaraj kaj armeaj institucioj kaj de laboristoj, kamparanoj, soldatoj kaj amasoj de aliaj rondoj de la ĉefurbo okazigas ĉi tie solenan celebran mitingon, por varme celebri, ke Kamarado Hua Guofeng fariĝis prezidanto de la Centra Komitato de la Komunista Partio de Ĉinio kaj prezidanto de la Milita Komisiono de la Centra Komitato de la Komunista Partio de Ĉinio, kaj varme celebri, ke nia partio akiris grandan venkon en frakaso de la intrigo uzurpi la gvidantecon de la Partio kaj la ŝtato fare de la kontraŭpartia kliko de Vang Hongven, Ĝang Ĉunkiaŭ, Giang King kaj Jaŭ Venjuan. Dum la lastaj kelkaj tagoj, la tuta partio, la tuta armeo kaj la popolo de ĉiuj naciecoj de la tuta lando sentas ĝojon el la korfundo kaj la tuta lando jubilas en celebrado. Centmilionoj da popolanoj suriris stratojn unuj post aliaj por varme celebri tiun ĉi grandan venkon kun decida signifo akiritan de la proletaro en rebato kontraŭ la atako de la burĝaro.

Antaŭ unu kaj duona monatoj, ni perdis la grandan gvidanton kaj instruiston Prezidanton Maŭ Zedong. La tuta partio, la tuta armeo kaj la popolo de ĉiuj naciecoj de la tuta lando dronis en ekstrema malĝojo, kaj ĉiuj maltrankviliĝis pri la sorto kaj la estonteco de la Partio kaj la ŝtato, kaj maltrankviliĝis pri tio, ĉu la Centra Komitato de nia partio povas aŭ ne daŭrigi la aferon postlasitan de Prezidanto Maŭ, persisti en la fundamentaj linio kaj politikoj formulitaj de Prezidanto Maŭ por nia partio kaj konduki ĝis la fino la proletan revolucian aferon. Pri tiu ĉi problemo zorgis ankaŭ la internacia proletaro kaj diverslandaj revoluciaj popoloj. Tiuj maltrankvilo kaj zorgo ne estas senkaŭzaj. Tiutempe,

efektive aperis nigra nubo en la ĉielo super nia lando. Profitante la okazon ke Prezidanto Maŭ grave malsaniĝis kaj forpasis, la kontraŭpartia kliko de Vang Hongven, Ĝang Ĉunkiaŭ, Giang King kaj Jaŭ Venjuan senpacience provis uzurpi la plej altan gvidantecon de la Partio kaj la ŝtato. Ni frontis al la aktuala danĝero ke la Partio fariĝus reviziisma kaj la ŝtato ŝanĝus sian politikan koloron. Nia partio troviĝis en grave malfacila momento. Post la morta lukto inter la du klasoj, du vojoj kaj du linioj, nia partio triumfis, la proletaro triumfis kaj la popolo triumfis!

Ni firme subtenas la rezolucion de la Centra Komitato de la Komunista Partio de Ĉinio je la sepa de oktobro, 1976, ke Kamarado Hua Guofeng fariĝis prezidanto de la Centra Komitato de la Komunista Partio de Ĉinio kaj prezidanto de la Milita Komisiono de la Centra Komitato de la Komunista Partio de Ĉinio. Kamarado Hua Guofeng estas elektita persone de la granda gvidanto Prezidanto Maŭ kiel lia daŭriganto. En aprilo de 1976, Prezidanto Maŭ persone proponis, ke Kamarado Hua Guofeng estu la unua vicprezidanto de la Centra Komitato de la Komunista Partio de Ĉinio kaj ĉefministro de la Ŝtata Konsilantaro. Je la 30-a de aprilo, Prezidanto Maŭ propramane skribis al Kamarado Hua Guofeng: **"Se aferoj estas en viaj manoj, mi estas trankvila."** Tio esprimis lian senliman fidon al Kamarado Hua Guofeng. En la ŝlosila momento de la ĉina revolucio post la forpaso de Prezidanto Maŭ, la Centra Komitato de la Partio estrata de Kamarado Hua Guofeng alprenis rezolutajn rimedojn por malkovri la kontraŭpartian klikon de Vang Hongven, Ĝang Ĉunkiaŭ, Giang King kaj Jaŭ Venjuan, per tio savis la revolucion, savis la Partion, firmigis la diktaturon de la proletaro en nia lando kaj ebligis al nia partio, nia armeo kaj la popolo de ĉiuj naciecoj de nia lando daŭre venke marŝi antaŭen laŭ la direkto montrita de Prezidanto Maŭ al socialismo kaj komunismo. La Centra Komitato de la Partio estrata de Kamarado Hua Guofeng gajnis elkoran amon kaj respekton kaj varman subtenon de la tuta partio, la tuta armeo kaj la popolo de ĉiuj naciecoj de la tuta lando. La praktiko de la batalo pruvis, kiel saĝan decidon faris Prezidanto Maŭ siatempe. La afero de Prezidanto Maŭ havas indan daŭriganton, kaj nia partio denove havas sian gvidanton Prezidanton Hua Guofeng.

Ni varme aklamas la grandan venkon de nia partio super la kontraŭpartia kliko de Vang Hongven, Ĝang Ĉunkiaŭ, Giang King kaj Jaŭ Venjuan. Tiu ĉi kontraŭpartia kliko rifuzis obei kion Prezidanto Maŭ diris, senbride distordis Marksismon-Leninismon-Maŭzedongpenson, oponis kontraŭ la proleta revolucia linio de Prezidanto Maŭ kaj praktikis reviziismon sub la mantelo de Marksismo. Ili formis "kvarpersonan bandon" kaj kondukis sektajn aktivadojn por spliti la Partion. Ili energie faris konspirojn kaj intrigojn, vane intencante faligi grandan nombron da respondecaj kamaradoj de la Partio, la registaro kaj la armeo en la centraj kaj lokaj organoj kaj uzurpi la gvidantecon de la Partio kaj la ŝtato. Dum la periodo, kiam Prezidanto Maŭ grave malsaniĝis kaj post kiam li forpasis, ili faris des pli frenezan atakon kontraŭ la Partio kaj senpacience provis uzurpi la plej altan gvidantecon de la Partio kaj la ŝtato. Ili adoris fremdlandajn objektojn, flatis al fremdlanduloj kaj tenis kontraŭleĝajn rilatojn kun fremdlanduloj, energie praktikante kapitulacismon kaj nacian perfidon. La esenco de ilia linio estas deradike perfidi Marksismon-Leninismon-Maŭzedongpenson, enlande, ŝanĝi la proletan karakteron de nia partio, renversi la diktaturon de la proletaro en nia lando kaj restaŭri kapitalismon, kaj eksterlande, forlasi la principojn de la proleta internaciismo kaj kapitulaci al imperiismo. Prezidanto Maŭ montris: **"Konduki socialisman revolucion kaj tamen ne scii, kie estas la burĝaro. Ĝi ĝuste estas interne de la komunista partio, nome la enpartiaj potencteneantoj irantaj la kapitalisman vo-**

**jon. Ili ankoraŭ iras tiun vojon."** Ĉiuj agoj de la kontraŭpartia kliko de Vang Hongven, Ĝang Ĉunkiaŭ, Giang King kaj Jaŭ Venjuan pruvis, ke ĝuste ili estas la tipaj reprezentantoj de la enpartia burĝaro, estas pentorifuzantaj enpartiaj potenctenantoj obstine irantaj la kapitalisman vojon, kaj estas bando da burĝaj konspiruloj kaj karieristoj. La batalo de nia partio kontraŭ tiu ĉi kontraŭpartia kliko de Vang Hongven, Ĝang Ĉunkiaŭ, Giang King kaj Jaŭ Venjuan estas morta batalo inter la proletaro kaj la burĝaro, inter socialismo kaj kapitalismo kaj inter Marksismo kaj reviziismo. La kontraŭpartia kliko provis spliti nian partion, tio estis nur ilia vana revo. Tute perdinte la simpation de la popolo ili estas ekstreme izolaj kaj malfortaj. La Centra Komitato de la Partio estrata de Kamarado Hua Guofeng, daŭrigante la aferon postlasitan de Prezidanto Maŭ, ĝustatempe kaj decideme malkovris la intrigon de tiu ĉi kontraŭpartia kliko uzurpi la gvidantecon de la Partio kaj la ŝtato. Tio pruvis, ke nia partio meritas la nomon de partio fondita, hardita kaj kulturita persone de Prezidanto Maŭ, meritas la nomon de marksisma-leninisma partio politike matura kaj meritas la nomon de partio granda, glora kaj ĝusta. La venko de la batalo super tiu ĉi kontraŭpartia kliko estas granda venko de la Granda Proleta Kultura Revolucio kaj granda venko de Maŭzedongpenso. La venko de tiu ĉi batalo havas grandan aktualan signifon kaj profundan historian signifon por ni en persistado de la fundamentaj linio kaj politikoj de la Partio formulitaj de Prezidanto Maŭ por la tuta socialisma historia periodo, kaj konduko de la proleta revolucia afero ĝis la fino, en opono kontraŭ kaj prevento de reviziismo, firmigo de la diktaturo de la proletaro en nia lando, prevento de kapitalisma restaŭro, kaj konstruo de socialismo, kaj en persistado de la principoj de la proleta internaciismo, firma plenumo de la revoluciaj diplomatiaj linio kaj politikoj de Prezidanto Maŭ, kaj unuiĝo kun la internacia proletaro kaj la revoluciaj popoloj de ĉiuj landoj, precipe la popoloj de la landoj de la tria mondo por kune fari la batalon kontraŭ imperiismo, reviziismo kaj reakciularo, precipe kontraŭ la hegemoniismo de la du superpotencoj Sovetunio kaj Usono.

Ni nepre devas plej kompakte unuiĝi ĉirkaŭ la Centra Komitato de la Partio estrata de Prezidanto Hua Guofeng, daŭrigi la aferon postlasitan de Prezidanto Maŭ, alte teni la grandan ruĝan standardon de Marksismo-Leninismo-Maŭzedongpenso, persisti en la fundamenta linio de la Partio, persisti en daŭrigo de la revolucio sub la diktaturo de la proletaro, levi novan alttajdon de studo de verkoj de Marks, Engels, Lenin kaj Stalin kaj verkoj de Prezidanto Maŭ. Ni devas ĝisfunde malkovri kaj kritiki la kontraŭpartian klikon de Vang Hongven, Ĝang Ĉunkiaŭ, Giang King kaj Jaŭ Venjuan, firmigi kaj disvolvi la venkojn de la Granda Proleta Kultura Revolucio, firmigi kaj disvolvi la grandan unuiĝon de la popolo de ĉiuj naciecoj gvidatan de la laborista klaso kaj bazitan sur la laborista-kamparana alianco. Ni devas preni klasbatalon kiel la ĉefĉeneron, **teni la revolucion, stimuli la produktadon kaj aliajn laborojn kaj preparon kontraŭ milito,** kaj pluapaŝe disvolvi la bonegan situacion. Kvankam troviĝos ankoraŭ malfaciloj kaj zigzagoj sur la antaŭenmarŝa vojo, tamen ni firme kredas, ke la perspektivo estas brila. Sub la gvido de la Centra Komitato de la Partio estrata de Prezidanto Hua Guofeng, ni certe povas unuiĝi kun ĉiuj unuigeblaj fortoj, mobilizi ĉiujn pozitivajn faktorojn kaj pli bone fari la socialisman revolucion kaj socialisman konstruadon de nia lando. **Unuiĝu por gajni ankoraŭ pli grandajn venkojn!**

Vivu la granda, glora kaj ĝusta Komunista Partio de Ĉinio!

Vivu la ĉiamvenka Marksismo-Leninismo-Maŭzedongpenso!

# Granda historia venko

— Ĉefartikolo de la ĵurnalo *Renmin Ribao*, la gazeto *Hong Qi* kaj la ĵurnalo *Jiefangjun Bao*

Ruĝaj flagoj flirtas super la vasta tero de nia patrolando, kaj la vizaĝoj de la okcent milionoj da popolanoj disradias ĝojon. Centoj da milionoj da popolanoj en ĉiuj partoj de nia lando faris grandiozajn manifestaciojn en la lastaj tagoj kaj miliono da armeanoj kaj popolanoj de nia ĉefurbo Pekino okazigis hieraŭ solenan mitingon por varme celebri, ke Kamarado Hua Guofeng fariĝis prezidanto de la Centra Komitato de la Komunista Partio de Ĉinio kaj prezidanto de la Milita Komisiono de la Centra Komitato de la Komunista Partio de Ĉinio, varme celebri la grandan venkon en frakaso de la intrigo de la kontraŭpartia kliko de Vang Hongven, Ĝang Ĉunkiaŭ, Giang King kaj Jaŭ Venjuan por uzurpi la partian kaj ŝtatan potencon, kaj indigne kondamni la krimegojn de la "kvarpersona bando". La tuta partio, la tuta armeo kaj la popolo de ĉiuj naciecoj en la tuta lando decidis plej kompakte unuiĝi ĉirkaŭ la Centra Komitato de la Partio estrata de Prezidanto Hua Guofeng, daŭrigi la aferon postlasitan de Prezidanto Maŭ kaj konduki la aferon de la proleta revolucio ĝis la fino.

Kamarado Hua Guofeng estas elektita persone de la granda gvidanto Prezidanto Maŭ kiel lia daŭriganto. En aprilo de 1976, Prezidanto Maŭ proponis, ke Kamarado Hua Guofeng estu la unua vicprezidanto de la Centra Komitato de la Komunista Partio de Ĉinio kaj ĉefministro de la Ŝtata Konsilantaro. Poste, en la 30-a de aprilo, Prezidanto Maŭ skribis propramane al Kamarado Hua Guofeng "**Se aferoj estas en viaj manoj, mi estas trankvila**". Laŭ la aranĝo de Prezidanto Maŭ farita antaŭ lia forpaso, la Centra Komitato de la Komunista Partio de Ĉinio faris rezolucion je la 7-a de oktobro, 1976, ke Kamarado Hua Guofeng estu prezidanto de la Centra Komitato de la Komunista Partio de Ĉinio kaj prezidanto de la Milita Komisiono de la Centra Komitato de la Komunista Partio de Ĉinio. Tio estas la komuna deziro de la tuta partio, la tuta armeo kaj la popolo de la tuta lando kaj estas granda venko en frakaso de la intrigo de la "kvarpersona bando" por uzurpi la partian kaj ŝtatan potencon. Tio estas ĝojiga afero havanta grandegan historian signifon. Kamarado Hua Guofeng, al kiu Prezidanto Maŭ havis senliman fidon kaj kiun la popolo de la tuta lando kore amas, estas nun la gvidanto de nia partio, tiel ke niaj partio kaj ŝtato havas fidindan stiriston por daŭrigi nian venkan antaŭenmarŝon laŭ la proleta revolucia linio de Prezidanto Maŭ.

La Centra Komitato de la Partio estrata de Kamarado Hua Guofeng frakasis la intrigon de

la " kvarpersona bando" pri kontraŭrevolucia restaŭro kaj forigis grandan malbonon por nia partio. Vang, Ĝang, Giang kaj Jaŭ delonge jam formis bandon kaj okupiĝis pri frakciismaj aktivadoj por spliti la Partion. La granda gvidanto Prezidanto Maŭ jam rimarkis tion antaŭ longe, severe kritikis kaj edukis ilin fojon post fojo, kaj faris aranĝojn por solvi ilian problemon. Prezidanto Maŭ kritikis ilin je la 17-a de julio, 1974, dirante: **"Vi devas atenti: Ne formu malgrandan frakcion de kvar personoj."** Prezidanto Maŭ kritikis ilin denove je la 24-a de decembro: **"Ne formu frakcion. Falos tiuj, kiuj tion faras."** En novembro kaj decembro de la sama jaro, kiam la Centra Komitato de la Partio faris preparon por okazigi la Kvaran Tutlandan Popolan Kongreson, Prezidanto Maŭ diris: **"Giang King havas ambicion. Ŝi volas, ke Vang Hongven fariĝu prezidanto de la Konstanta Komitato de la Tutlanda Popola Kongreso kaj ŝi mem fariĝu prezidanto de la Centra Komitato de la Partio."** Je la 3-a de majo, 1975, en kunveno de la Politika Buroo de la Centra Komitato de la Partio, Prezidanto Maŭ ripetis la fundamentajn principojn de "tri jesoj kaj tri neoj", kaj avertis ilin: **"Praktiku Marksismon-Leninismon, kaj ne reviziismon; unuiĝu, kaj ne splitiĝu; estu malkaŝemaj kaj honestaj, kaj ne faru konspirojn kaj intrigojn. Ne formu kvarpersonan bandon, ne plu faru tion. Kial vi ankoraŭ tion faras?"** En la sama tago Prezidanto Maŭ donis instrukcion pri ilia problemo: **"Se tio ne estos solvita en la unua duono de la kuranta jaro, ĝi estu solvita en la dua duono; se ne ĉijare, do venontjare; se ne venontjare, do en la jaro post ĝi."** Kontraŭ la kritiko kaj eduko de Prezidanto Maŭ, la "kvarpersona bando" alprenis sintenon de kontraŭrevoluciaj duvizaĝuloj, kiuj obeis publike sed malobeis kaŝe. Ili ne nur montris neniom da pento, sed male, iris pli kaj pli malproksimen sur la erara vojo. En la periodo kiam Prezidanto Maŭ grave malsaniĝis kaj post kiam li forpasis, ili faris ankoraŭ pli frenezan atakon al la Partio kaj senpacience klopodis uzurpi la plej altan gvidantecon de la Partio kaj la ŝtato, tiel ke ni alfrontis gravan danĝeron de reviziismiĝo de la Partio kaj alikoloriĝo de la ŝtato. En tiu kriza momento en la ĉina revolucio, la Centra Komitato de la Partio estrata de Kamarado Hua Guofeng, reprezentante la esencajn interesojn kaj komunan volon de la tuta partio, la tuta armeo kaj la tuta popolo, kun braveco de la proletaro, alprenis rezolutan paŝon kontraŭ la kontraŭpartia "kvarpersona bando", frakasis ilian intrigon uzurpi la partian kaj ŝtatan potencon, kaj savis la revolucion kaj la Partion. Tiamaniere la proletaro gajnis decidan venkon en rebato al la atako de la burĝaro.

La "kvarpersona bando" fatala por la lando kaj la popolo faris ekstreme grandajn krimojn. Ili tute perfidis la fundamentajn principojn de "tri jesoj kaj tri neoj" ripetade instruitajn de Prezidanto Maŭ, senbride distordis Marksismon-Leninismon-Maŭzedongpenson, distordis instrukciojn de Prezidanto Maŭ, oponis kontraŭ la proleta revolucia linio de Prezidanto Maŭ en serio da enlandaj kaj internaciaj problemoj, kaj praktikis reviziismon sub la ŝildo de Marksismo. Ili faris krimajn aktivadojn por spliti la Partion, agis en kliko, iris sian apartan vojon, formis sian propran sistemon en la Partio, agis laŭplaĉe, tiranis super aliaj, kaj metis sin super Prezidanton Maŭ kaj la Centran Komitaton de la Partio. Ili energie faris intrigojn kaj konspirojn kaj ŝovis sian nazon en ĉion por kaŭzi malordon, ĝenis la revolucian linion kaj strategiajn dispoziciojn de Prezidanto Maŭ kaj subfosis la socialisman revolucion kaj socialisman konstruadon. Ili konfuzis pravon kun malpravo,

fabrikis mensogojn, energie kreis kontraŭrevolucian publikan opinion, faris malverajn akuzojn kontraŭ aliaj, senskrupule etiketis aliajn pri kontraŭrevolucieco, kaj intencis faligi grandan nombron da gvidantaj kamaradoj de la Partio, registaro kaj armeo en la centraj kaj lokaj organoj por kapti gvidantecon de la Partio kaj la ŝtato. Ili adoris fremdlandajn objektojn kaj flatis al fremduloj, tenis kontraŭleĝajn rilatojn kun fremdlanduloj, perfidis gravajn partiajn kaj ŝtatajn sekretojn, kaj senskrupule praktikis kapitulacismon kaj naciperfidon. Per diversaj manovroj ili praktikis kontraŭrevolucian reviziisman linion, ekstreme dekstran linion. Prezidanto Maŭ montris: **"Konduki socialisman revolucion kaj tamen ne scii, kie estas la burĝaro. Ĝi ĝuste estas interne de la komunista partio, nome la enpartiaj potenctenantoj irantaj la kapitalisman vojon. Ili ankoraŭ iras tiun vojon."** Vang Hongven, Ĝang Ĉunkiaŭ, Giang King kaj Jaŭ Venjuan ĝuste estas tipaj reprezentantoj de la burĝaro en la Partio, pentorifuzantaj enpartiaj potenctenantoj obstine irantaj la kapitalisman vojon kaj bando de burĝaj konspiruloj kaj karieristoj.

Nia batalo kontraŭ la "kvarpersona bando" estas morta batalo inter la du klasoj, la du vojoj kaj la du linioj. Forminte egoisman klikon por uzurpi la partian kaj ŝtatan potencon, la "kvarpersona bando" intencis komplete ŝanĝi la proletan naturon de nia partio, ŝanĝi ĝian fundamentan linion por la tuta historia periodo de socialismo kaj restaŭri kapitalismon en Ĉinio. Se ilia intrigo estus sukcesinta, la ĉina popolo falus en seriozan katastrofon. La frakaso de tiu ĉi kontraŭpartia kliko forigis por la Partio kaŝitan danĝeron, forigis por la lando pestojn kaj senigis al la popolo indignon, multe kontentigante la Partion, la armeon kaj la popolon. Tio ĉi estas granda praktiko de la granda teorio de Prezidanto Maŭ pri daŭrigo de la revolucio sub la diktaturo de la proletaro. Ĝi havas grandan aktualan signifon kaj profundan historian signifon por ni en persisto pri la fundamenta linio de la Partio, opono kontraŭ kaj prevento de reviziismo, firmigo de la diktaturo de la proletaro, prevento de kapitalisma restaŭro, konstruo de socialismo, persisto pri internaciismaj principoj de la proletaro kaj plenumo de la revoluciaj diplomatiaj linio kaj politikoj de Prezidanto Maŭ. Ĝi estas granda venko de la Granda Proleta Kultura Revolucio kaj de Maŭzedongpenso.

Prezidanto Maŭ montris en 1971: **"Nia partio jam havas historion de 50 jaroj kaj spertis dek ĉefajn batalojn inter la du linioj. En tiuj dek bataloj iuj deziris spliti nian partion, sed neniu el ili sukcesis. Tio ĉi estas problemo studinda: Tiel granda lando, tiel multa loĝantaro, tamen sen splitiĝo. La sola akceptebla kialo estas, ke la popolo, la Partio kaj la partianoj oponas kontraŭ splitiĝo. Laŭ ĝia historio, nia partio havas brilan estontecon."**

Resuminte la sperton de nia partio en la dek bataloj inter la du linioj, Prezidanto Maŭ montris, ke **"la ĝusteco aŭ malĝusteco de la linio ideologia kaj politika decidas ĉion"**, kaj elmetis la tri fundamentajn principojn **"praktiku Marksismon, kaj ne reviziismon; unuiĝu, kaj ne splitiĝu; estu malkaŝemaj kaj honestaj, kaj ne faru konspirojn kaj intrigojn"**. Tiuj principoj estas nia kriterio por distingi ĝustan linion de erara linio kaj nia akra batalilo por malkaŝi burĝojn en la Partio. La tuta historio de nia partio montras, ke nur per persistado en la tri fundamentaj principoj nia partio povas marŝi laŭ unu takto, gajni tutkoran subtenon de la popolamasoj kaj organizi potencan revolucian ar-

meon, kaj nur per tio nia revolucia afero povas prosperi. Kiu agas kontraŭ la tri fundamentaj principoj, tiu perfidas la proletan revolucian aferon kaj la esencajn interesojn de la Partio kaj la popolo, neeviteble perdas la fidon de la popolo kaj trafos hontindan pereon. En la pasinteco, la ĉefoj de oportunismaj linioj dekfoje provis spliti nian partion, sed ili ĉiuj fiaskis. Ĉifoje, la kontraŭpartia kliko "kvarpersona bando" de Vang, Ĝang, Giang kaj Jaŭ praktikis reviziismon kaj splitismon, faris konspiron por uzurpi partian kaj ŝtatan potencon, tute perdis la fidon de la popolo kaj fariĝis ekstreme izola, kaj same trafis hontindan finon. Historio jam ripetfoje pruvis, ke estas malfacile ruinigi nian partion. Nia partio meritas la nomon de partio fondita, hardita kaj kulturita persone de Prezidanto Maŭ, partio politike matura marksisma-leninisma kaj partio granda, glora kaj ĝusta.

Aklamante la grandan historian venkon de nia partio, la tuta partio, la tuta armeo kaj la popolo de ĉiuj naciecoj de la tuta lando decidas, sub la gvido de la Centra Komitato de la Partio estrata de Prezidanto Hua Guofeng, alte teni la grandan ruĝan flagon de Marksismo-Leninismo-Maŭzedongpenso, persisti en preno de la klasbatalo kiel la ĉefĉenero, persisti en la fundamenta linio de la Partio kaj persisti en daŭrigo de la revolucio sub la diktaturo de la proletaro. Ni devas plene malkaŝi la krimegojn de la kontraŭpartia kliko de Vang, Ĝang, Giang kaj Jaŭ, penetrive kritiki ilian kontraŭrevolucian reviziisman linion kaj elimini ĝian venenan influon. Estas necese rigore distingi kaj ĝuste trakti la du malsamajn specojn de kontraŭdiroj, bone plenumi la principojn de Prezidanto Maŭ **"lerni el pasintaj eraroj por eviti estontajn, kuraci la malsanon por savi la homon"** kaj **"estas necese plivastigi la amplekson de edukado kaj redukti tiun de atakado"**, por unuiĝi kun ĉiuj kiuj estas unuigeblaj. Ni devas entuziasme subteni novajn socialismajn aferojn, konscience limigi burĝajn rajtojn kaj firmigi kaj disvolvi la venkojn de la Granda Proleta Kultura Revolucio. Ni devas **teni la revolucion, stimuli la produktadon kaj aliajn laborojn kaj preparon kontraŭ milito,** streĉi plene la energion kaj strebi forte antaŭen por konstrui socialismon multe, rapide, bone kaj ekonomie, kaj plue disvolvi la bonegan situacion.

Elimininte la "kvar pestojn", nia partio fariĝis pli solidara, pli forta kaj pli vivecplena, kaj la diktaturo de la proletaro de nia lando fariĝis ankoraŭ pli firma. La popolamasoj estas en altaj animvigleco kaj batalspirito; ĉie en nia patrolando orioloj kantas kaj hirundoj dancas. Aperas antaŭ ni **"politika situacio en kiu estas kaj centralizismo kaj demokratio, kaj disciplino kaj libereco, kaj unueca volo kaj persona senĝeneco kaj viveco"**. Ni havas tiel grandan partion, grandan armeon kaj grandan popolon, nenia malfacilo povas haltigi nian venkan marŝon. Sub la gvido de la Centra Komitato estrata de Prezidanto Hua Guofeng, ni certe povas plue antaŭenpuŝi la socialisman revolucion laŭ la linio kaj politikoj de Prezidanto Maŭ kaj, laŭ la granda plano elmetita de Prezidanto Maŭ, efektivigi plenampleksan modernigon de niaj agrikulturo, industrio, nacidefendo, scienco kaj tekniko kaj konstrui nian landon en potencan socialisman landon antaŭ la fino de tiu ĉi jarcento, fari relative grandan kontribuon al la homaro kaj batali por fine realigi komunismon.

La 25-an de oktobro, 1976

# Kamarado Hua Guofeng fariĝis gvidanto de nia partio, tio estis saĝa decido de Prezidanto Maŭ

de Redakcio de la ĵurnalo *Jiefangjun Bao*

Kamarado Hua Guofeng fariĝis prezidanto de la Centra Komitato de la Komunista Partio de Ĉinio kaj prezidanto de la Milita Komisiono de la Centra Komitato de la Partio; la Centra Komitato de la Partio estrata de Kamarado Hua Guofeng en unu frapo frakasis la intrigon de la kontraŭpartia kliko de Vang Hongven, Ĝang Ĉunkiaŭ, Giang King kaj Jaŭ Venjuan uzurpi la gvidantecon de la Partio kaj la ŝtato, tiuj du grandaj ĝojigaj aferoj estas granda venko de Marksismo-Leninismo-Maŭzedongpenso kaj ekstreme brila ĉapitro en la historio de nia partio. La tuta partio, la tuta armeo kaj la popolo de ĉiuj naciecoj de la tuta lando ĝojegas el la tuta koro kaj sentas sin senkompare fieraj kaj feliĉaj pro tio, ke ni denove havas nian gvidanton kaj ĉefkomandanton!

La granda gvidanto kaj instruisto Prezidanto Maŭ persone kulturis, elektis kaj instalis Kamaradon Hua Guofeng kiel sian daŭriganton. Kamarado Hua Guofeng fariĝis gvidanto de nia partio, tio estis saĝa decido farita de Prezidanto Maŭ antaŭ la forpaso.

Por elekti daŭriganton por nia partio Prezidanto Maŭ trapasis intensan batalon kontraŭ la du burĝaj komandejoj de Liu Ŝaŭki kaj Lin Biaŭ kaj tiun kontraŭ la Vang-Ĝang-Giang-Jaŭ-a kontraŭpartia kliko. Dum periodo de certa tempo, Vang Hongven, Ĝang Ĉunkiaŭ, Giang King kaj Jaŭ Venjuan formis "kvarpersonan bandon", faris intrigajn aktivadojn kun vana intenco uzurpi la plej altan gvidantecon de la Partio kaj la ŝtato. Prezidanto Maŭ penetrive rimarkis ĉion kaj ĝustatempe kritikis kaj severe riproĉis ilin, tial ilia intrigo ne sukcesis. Prezidanto Maŭ senlime konfidis Kamaradon Hua Guofeng kaj tre trankvile donis al li la gravan taskon gvidi la Partion kaj la ŝtaton. Antaŭvespere de la Kvara Tutlanda Popola Kongreso, la "kvarpersona bando" energie kondukis intrigajn aktivadojn por uzurpi la gvidantecon. Prezidanto Maŭ travidis ilian ambicion kaj malpermesis al ili "organizi kabineton". Post kiam forpasis nia estimata kaj amata Ĉefministro Ĝoŭ Enlaj, la "kvarpersona bando" plenforte klopodis por meti sian homon sur la postenon de ĉefministro. Sed Prezidanto Maŭ ne donis al ili la potencon kaj persone proponis ke Kamarado Hua Guofeng estu aganta ĉefministro. Tio vekis mortan malamon kaj

frenezan oponon de la "kvarpersona bando". Kontraŭ iliaj intrigoj, Prezidanto Maŭ plue persone proponis, ke Kamarado Hua Guofeng estu la unua vicprezidanto de la Centra Komitato de la Partio kaj ĉefministro de la Ŝtata Konsilantaro. Post nelonge Prezidanto Maŭ propramane skribis al Kamarado Hua Guofeng **"Se aferoj estas en viaj manoj, mi estas trankvila"**. Tiamaniere stariĝis la pozicio de Kamarado Hua Guofeng kiel daŭriganto de Prezidanto Maŭ, kaj la intrigoj de la "kvarpersona bando" por uzurpi la gvidantecon de la Partio kaj la ŝtato renkontis fojerefojan hontindan bankroton. Post intensa luktado inter la du klasoj kaj la du linioj, Kamarado Hua Guofeng fariĝis gvidanto de nia partio kaj la saĝa decido farita de Prezidanto Maŭ siatempe estas rapide realigita, tio estas granda venko de la proletaro super la burĝaro kaj Marksismo super reviziismo.

La historio de la internacia komunisma movado kaj nia partio diris al ni, ke la proletaro kaj ĝia politika partio nepre devas havi sian propran marksisman gvidanton. La historio estas kreita de la popolo; kaj dum la procezo de kreado de la historio la popolamasoj neeviteble naskas sian gvidanton. Havante la revolucian gvidanton, kiu reprezentas la fundamentajn interesojn, volon kaj deziron de la vastaj popolamasoj kaj unuigas kaj organizas ilin, la revolucio vigle disvolviĝas kaj venke marŝas antaŭen, alie, la revolucio suferas obstaklon kaj fiaskon. La granda idealo de komunismo povos esti plene realigita nur post persistema kaj neŝancelebla luktado fare de multaj generacioj. Havi aŭ ne fidindajn revoluciajn daŭrigantojn estas granda problemo koncernanta tion, ĉu povas aŭ ne daŭre marŝi antaŭen la marksisma-leninisma revolucia afero komencita de la maljuna generacio de proletaj revoluciistoj. La sursceniĝo de la renegata kliko de Ĥruŝĉov-Brejnev en Sovetunio kaŭzis tion, ke la marksisma-leninisma partio fondita de Lenin degeneris en reviziisman kaj faŝisman partion kaj la unua socialisma lando de la mondo en social-imperiismon. Kiom tragika leciono tio estas! Elirinte el la fundamentaj interesoj de la ĉina popolo kaj la internacia komunisma afero, Prezidanto Maŭ alte taksis la problemon pri revoluciaj daŭrigantoj. Prezidanto Maŭ profunde eksplikis la signifon de kulturado kaj kreado de daŭrigantoj de la revolucia afero, montrante, ke **"ĝi estas problemo treege grava, de vivo kaj morto por nia partio kaj nia ŝtato. Ĝi estas problemo de fundamenta graveco por la afero de proleta revolucio por cent, por mil, eĉ por dekmil jaroj"**. Li elmetis la kvin kondiĉojn de daŭrigantoj de la proleta revolucia afero kaj la tri fundamentajn principojn **"praktiku Marksismon, kaj ne reviziismon; unuiĝu, kaj ne splitiĝu; estu malkaŝemaj kaj honestaj, kaj ne faru konspirojn kaj intrigojn"**. Li emfazis, ke la daŭrigantoj de la revolucia afero **kreskas hardante sin en grandaj revoluciaj ŝtormoj** kaj ke la gvidantoj de la proletaro **estas ĝenerale rekonataj de la amasoj en la batalo kaj praktikado sed ne sinnomitaj**. Prezidanto Maŭ ne nur komplete elmetis la teorion pri la daŭrigantoj de la proleta revolucia afero, sed ankaŭ tre atentis pri la ekzamenado, elektado kaj kulturado de la revoluciaj daŭrigantoj en la batalo. Li gvidis nin en foje-refoja malkovrado de la burĝaj karieristoj, konspiruloj kaj personoj de Ĥruŝĉov-tipo, kaŝitaj en la Partio, persone elektis Kamaradon Hua Guofeng kiel sian daŭriganton, tiamaniere garantiis, ke la gvidanteco de nia partio kaj nia ŝtato daŭre restas en la manoj de proletaj revoluciistoj. Tio estas alia granda kontribuo farita de Prezidanto Maŭ por la ĉina revolucio.

Kamarado Hua Guofeng estas lojala al Marksismo-Leninismo-Maŭzedongpenso kaj al la granda teorio de Prezidanto Maŭ pri daŭrigo de la revolucio sub la diktaturo de la proletaro, estas lerta en kombino de revolucia teorio kun konkreta praktiko de revolucio kaj estas firma en plenumado de la proleta revolucia linio de Prezidanto Maŭ kaj serio da liaj principoj kaj politikoj.

Kamarado Hua Guofeng eltenis longtempan provadon kaj akumulis riĉan sperton dum la novdemokratia revolucio, socialisma revolucio kaj socialisma konstruado, la Granda Proleta Kultura Revolucio kaj en akraj kaj komplikaj bataloj en- kaj eksterlandaj. Elirinte el dialektika materiismo kaj historia materiismo, Prezidanto Maŭ alte taksis tion, ke revoluciaj gvidantoj nepre devas posedi riĉan praktikan sperton, kaj laŭdis Kamaradon Hua Guofeng, ke li posedas sperton en gvidado de ĉiuflanka laboro de gubernio, subprovinco kaj provinco kaj sperton de laboro en la centraj organoj. La faktoj pruvis, ke kulturate persone de Prezidanto Maŭ, Kamarado Hua Guofeng estas elstara marksisma gvidanto kiu havas la talenton kaj kapablon gvidi ĉiuflankan laboron de la tuta partio kaj la tuta lando, kapablas ĝuste trakti gravajn problemojn de la Partio kaj la ŝtato en malfacilaj kaj komplikaj cirkonstancoj.

Kamarado Hua Guofeng estas lojala al la Partio, senegoisma, honesta kaj malkaŝema, modesta kaj singardema. Kun sia profunda observa povo Prezidanto Maŭ montris, ke Kamarado Hua Guofeng havas la bonajn kvalitojn por esti daŭriganto de la partia gvidanto. La tuta partio, la tuta armeo kaj la tutlanda popolo vidis, ke Kamarado Hua Guofeng estas demokratia en sia laborstilo, afabla kaj facile alirebla, estas lerta en unuiĝo kun kamaradoj por labori kune, konservas intimajn rilatojn kun la amasoj, prizorgas la amasojn, firme staras kune kun la popolamasoj, tutkore servas al la interesoj de la popolo kaj estas karulo de la proletaro kaj la vasta laboranta popolo.

Kun malproksima kaj akra vido, saĝeco kaj decidemo, Kamarado Hua Guofeng neniam cedas en gravaj aferoj de principo. Li estas pacienca kaj prudenta kaj ankaŭ persistas en batalo. Antaŭ sia forpaso, Prezidanto Maŭ signifoplene rakontis al Kamarado Hua Guofeng la historion, kiel Liu Bang (la unua imperiestro de Handinastio) antaŭ sia morto ekvidis konspiron de imperiestrino Lju kaj aliaj de ŝia klano perfidi la landon kaj uzurpi potencon. Kamarado Hua Guofeng gravuris en sia menso la vortojn de Prezidanto Maŭ kaj ne vanigis lian ardan esperon. Ĉe la ŝlosila momento, kiam Vang, Ĝang, Giang kaj Jaŭ senpacience provis uzurpi la gvidantecon de la Partio kaj la ŝtato kaj la revolucia afero frontis al grava danĝero, Kamarado Hua Guofeng persone faris la decidon kaj la Centra Komitato de la Partio estrata de Kamarado Hua Guofeng alprenis tre decidemajn rimedojn kaj frakasis en unu frapo la intrigon de la "kvarpersona bando", tiamaniere savis la revolucion kaj la Partion. Ĉio ĉi tio montris grandan bravecon kaj revolucian spiriton de Kamarado Hua Guofeng kiel proleta revoluciisto.

La praktiko de la revoluciaj bataloj plene pruvis, ke Kamarado Hua Guofeng tute povas fidele daŭrigi la aferon postlasitan de Prezidanto Maŭ, kaj konduki la revolucian ŝipon antaŭen kontraŭ la ondoj laŭ la vojo malfermita de Prezidanto Maŭ. Kiam ni plenverve aklamas Kamaradon Hua Guofeng kiel gvidanton de nia partio kaj varme celebras la grandan venkon en frakaso de la intrigo de la "kvarpersona bando" uzurpi la gvidantecon de la Partio kaj la ŝtato, ni rememoras, kiel Prezidanto Maŭ dediĉis sian tutan vivon kaj energion al la revolucia afero de la ĉina popolo kaj aliaj popoloj de la mondo, kaj kiel li elektis la plej fidindan daŭriganton de la revolucia afero por ke niaj partio kaj ŝtato ne ŝanĝu sian koloron kaj la popolo ĝuu feliĉon generacion post generacio, ni des pli sopiras kaj respektas la grandan gvidanton Prezidanton Maŭ kaj des pli profunde sentas, kiel saĝa estas la decido de Prezidanto Maŭ kaj kiel profunda estas ĝia signifo.

**"Tumultas vent' kaj tondro, standardoj, flagoj svarmas—jen mondo de l' homaro."** Sub la gvido de la Centra Komitato de la Partio estrata de Prezidanto Hua, ni forbalais la "kvar pestojn", nia patrolando bolas de entuziasmo kaj la okcent milionoj da popolanoj estas en alta batalvolo kaj animvigleco. Nia partio havas vastan perspektivon. Nia lando havas senliman futuron. Ni plej kompakte unuiĝu ĉirkaŭ la Centra Komitato de la Partio estrata de Prezidanto Hua, alte tenu la grandan ruĝan standardon de Marksismo-Leninismo-Maŭzedongpenso, kaj brave batalu kaj impete antaŭenmarŝu triumfe por firmigi la diktaturon de la proletaro kaj realigi la grandan idealon de komunismo!

# Armeanoj kaj popolanoj de diversaj lokoj de la tuta lando en solena kunveno kaj manifestacio por

# CELEBRO DE LA GRANDAJ VENKOJ




En Pekino




En Sanhajo

En Tiangin





En Nankino de
Giangsu-provinco




En Ĉengdu de
Siĉuan-provinco




En Ginan de Ŝandong-provinco




En Kantono de Guangdong-provinco



En Vuhan de
Hubej-provinco




En Fuĝoŭ de
Fugian-provinco





En Ŝenjang de
Liaŭning-provinco



En Urumĉi de la Hingiang-a Ujgura Aŭtonoma Regiono



En Kunming de Junnan-provinco




En Lanĝoŭ de Gansu-provinco




En Huhhot de la Aŭtonoma Regiono de Interna Mongolio




En Tajjuan de Ŝanhi-provinco

En Hefej de Anhuj-provinco




En Lasao de la Tibeta Aŭtonoma Regiono





En Ĉangŝa de Hunan-provinco




En Gujjang de Gujĝoŭ-provinco




En Ŝigiaĝuang de Hebej-provinco




En Harbin de Hejlonggiang-provinco



En Hining de Kinghaj-provinco




En Hanggoŭ de
Ĝegiang-provinco




En Hi-an de Ŝenhi-provinco




En Nanning de la Guanghi-a Gŭang-nacieca Aŭtonoma Regiono




En Nanĉang de Giang-hi-provinco




Patriotaj Tajvananoj loĝantaj en Pekino celebras grandan venkon.



En Ĉangĉun de Gilin-provinco




En Jinĉuan de la Ninghia-a Huj-nacieca Aŭtonoma Regiono




En Ĝengĝoŭ de Henan - provinco




世界语《中国报道》一九七七年第一期（本刊代号：二——九一五）